# TEA-BULTENO

11A JARO — MAJO - JUNIO 2008 — NUMEROJ 5-6

**Kiu bonfaras, frapas je la pordo; kiu amas, trovas malfermita la pordon.**
*Rabindranath Tagore (1861-1941)*

# Datrevena Simpozio

***El Gazetaraj komunikoj de UEA***

La 24an de aprilo okazis en la Ĝeneva sidejo de Unuiĝintaj Nacioj simpozio pri lingvaj homaj rajtoj, dediĉita al la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la 60a datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Unuafoje simila simpozio okazis 10 jarojn pli frue, lige kun la 90a datreveno de UEA kaj 50a de la Deklaracio. Memorigante pri la iama traktado pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj en la sama loko, Palaco de Nacioj, la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta atentigis: "En ĉi tiu loko Francio iam metis sian vetoon kontraŭ Esperanto. Eble Privat nun kontentus pri ni."

Bondezirojn por la simpozio sendis la ĝenerala direktoro de la Ĝeneva Oficejo de UN, s-ro Sergio A. Ordzonikdze. Li gratulis la Asocion pro ĝia jubileo kaj menciis i.a.: "UEA faras signifan kontribuon al la antaŭenigo de lingvaj rajtoj en la mondo, precipe pere de sia aktivado subtene al la rajto uzi kaj esti edukata en sia propra gepatra lingvo."

La estro de la UN-Oficejo por ligoj kun NeRegistaraj Organizoj (NRO), s-ro Ricardo Espinosa, mem ĉeestis kaj salutparolis. Mesaĝon de la prezidanto de CONGO (komunumo de NRO-j en oficialaj rilatoj kun UN), s-ro Liberato Bautista, peris ties unua vicprezidanto, s-ino Anna Biondi. La antaŭa prezidanto, s-ino Renate Bloem, kunprezidis la matenan sesion. Nome de Svisa Esperanto-Societo salutis ĝia kunprezidanto Didi Weidmann, kiu elstarigis la rolon de la svisa Esperanto-movado kiel akuŝinto de la jubileanta UEA. Fine de la malferma solenaĵo la prezidanto Dasgupta, krom saluti en la nomo de UEA, samtempe faris prezenton pri substancaj lingvaj rajtoj.

En la programo estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj: d-ino Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde, Danlando) prelegis pri "*Lingvo, edukado kaj (rompo de) homaj rajtoj*". Ŝi aparte emfazis la lingvan rajton de infanoj ricevi edukon en sia gepatra lingvo, kaj la genocidajn situaciojn, kiuj ekzistas, kiam oni praktike devigas la infanojn de difinita popolo transiri al alia lingvo. La temo de prof. François Grin (Universitato de Ĝenevo) estis "*Interkompreniĝo kiel strategio por lingva justeco*". Li pritraktis modelon, pri kiu li nun laboras, por utiligi la interkompreneblecon inter lingvoj de la sama grupo en Eŭropo, por malpliigi la traduk-kvanton kaj samtempe garantii al ĉiu servon en lingvo, kiun li/ŝi povas facile kompreni. Kunlaboranto de Grin, d-ro Michele Gazzola prelegis pri "*Instruado en universitatoj: la lingvaj gajnoj kaj malgajnoj pro internaciismo*". Li traktis la malpozitivajn sekvojn de la troigo de la bezono instrui en la angla en eŭropaj universitatoj kaj de la diskriminacioj kontraŭ esploristoj, kiuj ne verkas en la angla. Kiel reprezentantoj de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio, pri ties situacio parolis respektive John Mateo Lopez, ambasadoro Ronald Barnes kaj Flor Rayen Calfunao Paillalef.

En la simpozio partoprenis ĉirkaŭ 70 homoj el 13 landoj. Proksimume duono estis ne-esperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la ĉeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean.

Jam antaŭ la simpozio ekfunkciis ĝia retpaĝaro: www.linguistic-rights.org. La paĝaro estos plu evoluigata por fariĝi atentopunkto por ĉiuj, kies lingvaj rajtoj estas malobservataj, kaj por ke oni ĝenerale ekkonsciu, ke Esperanto estas rimedo por defendi lingvajn rajtojn.

Roterdamo, 28 aprilo 2008

## Mesaĝo de la Uea-Prezidanto al la Esperantistaro

En Ĝenevo, la 28an de aprilo 1908, Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asocion. Nek la senmondmilita mondo de la tiama tempo, nek la ideo de universaleco, nek la sento de identeco de la esperantistoj restis la samaj ĝis la hodiaŭa tago, en kiu ni, kun ĝojo kaj ankaŭ kun porokaza enpensiĝo, festas la centjariĝon de realaĵo nun ĝenerale rekonata kiel la reprezenta monda Esperanto-organizaĵo.

Mi volus tiun ĝojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. Indas dividi ankaŭ niajn ĉi-okazajn primeditojn. Historiistoj jam dediĉis al tiu ĉi jubileo klerigajn intervenojn. Sendube sekvos aliaj kontribuaĵoj; ni ne perdu ĉi tiun okazon, en kaj ekster la Asocio, rerigardi ĝian unuan jarcenton, kaj legi kontribuaĵojn de aliaj por firmigi nian kolektivan konversacion same vigle, kiel ni tion faris okaze de la centjariĝo de la lingvo mem.

**Feste salutas Probal Dasgupta**

# Instruado en la angla

En la semajna revuo *Internazionale* rimarkeblas tutpaĝa reklamanonco anglalingva de *International University College of Turin* [Internacia universitata kolegio de Torino] (Regiono Piemonte). Instrulingvo: la angla. Lerneja takso: € 36.000 por du lernojaroj.

*Internazionale* estas revuo, aperiganta itallingvajn tradukojn de aro da artikoloj el la tutmonda gazetaro. Do, tre impresis min interrilato de tiu reklamo kun artikolo el la anglalingva semajna revuo OUTLOOK de Hindio – *English speaking curse* [La damno de la angla parolado] de Anjali Puri – kie estas priskribita la malesperiga situacio ĉe la hinda junularo pro la obseda strebo elposedi la anglan.

Tiel komenciĝas la artikolo:

<<La lerneja dosiero de Brajesh Kumar estas tute malplena: neniu paĝo kun fingrospuroj aŭ makuloj, eĉ ne unu ĉifita folio. La tempo mankis. Brajesh sinmortigis post malmultaj semajnoj, ekde kiam li estis vizitinta privatan internulejon pri inĝenierio en ekskluziva kvartalo de *Noida*, tiu ekonomia zono speciale starigita porde de la ĉefurbo Delhi en 1976. Li estis 22-jara. Postlasita noto klarigis, ke li ne kapablas plu sekvi la lecionojn en la angla. Naskiĝinta en Jaunpur, ŝtato de Uttar Pradesh, li diplomiĝis pri inĝenierio kaj estis akceptita en la dua kursojaro ĉe la internulejo de Noida.>>

Tiu drama situacio ne estas unika sed bedaŭrinde komuna al pluraj hindaj junuloj. Dum la lastaj monatoj almenaŭ kvar aliaj universitataj studentoj sinmortigis pro frustriĝo. Tiaj tragediaj eventoj kaŝitas malantaŭ bildo de anglofona kaj sukcesinta Hindio: hindaj aŭtoroj akiras internaciajn premiojn; la lando aktiviĝas konkurence en la mondo; libroj, diskoj kaj dvd-oj ĉie sukcesas per tiu memfarita angla, tiu *inglish*, miksaĵo de lingvoj hinda kaj angla. "Per ĝi," skribas la rubrikisto kaj industria konsilanto Durcharan Das, "la hindoj eble jam «konkeris» la anglan". Sed tio estas devojiĝo, ĉar *inglish* estas ia mismaniero paroli kaj skribi la anglan, ne permesanta superi la limon inter la perfekta parolanto kaj tiu, kiu la anglan ne scipovas.

En Hindio ekzistas pluraj variaĵoj de la angla, kaj, ĉe plurnaciaj teknologiaj industriegoj, la lingvaj baroj forpuŝas ĉiujn kandidatojn escepte de eta aro da universitataj magistroj.

"Hindoj kapablas uzi la anglan en difinita kultura kunteksto – asertas Uma K. Raman, vicdirektorino de departemento pri industria forĝado – sed ofte ili ne sukcesas ĝin korekte uzi por komuniki kun nehindaj interparolantoj".

Pluraj faktoroj influas la ekeston kaj enradikiĝon de tiu ĉi situacio: nesufiĉa fundamenta alfabetigo de la lernantoj, tute ne ekzistanta sistemo preparanta instruistojn taŭgajn por lernigi sian studobjekton en la angla, svarmado de lingvaj "akademioj" tra la provincaj urboj kaj eĉ en montaraj lokoj, kiujn ĉefe karakterizas malalta nivelo kaj de instrumetodoj kaj de instruistoj.

Do, *British Council* – ŝtata brita organizo – multe investis cele al formado de eĉ 750 mil hindaj instruistoj pri la angla, tiamaniere malfermante la hindan merkaton al la varoj, spertuloj, institucioj de la Unuiĝinta Reĝolando, precizigas la lingvisto N. S. Prabhu, krome atentigante ke "lerni rapide lingvon estas iluzio. Lernado de lingvo, male, estas sistema procedo. Ne eblas kreskigi planton dum tri tagoj, anstataŭ tri jaroj".

Mohandas Karamchand Gandhi, farinto de la Hindia sendependeco per senperforta revolucio, skribis en sia verko *"Hind Swaraj or Hindian Home Rule"* (ĉap. XVIII): «Doni al milionoj da homoj scipovon nur de la angla estas kiel ilin sklavigi». Ŝajnas nun, ke la Hindoj memvole igas sin denove sklavoj de tiu obsedo nepre scipovi la anglan, kiu siaflanke kaŭzas pereigan perdon de identeco, kun eĉ dramaj sekvoj.

Ankaŭ en Italio oni jam estas enkondukanta anglalingvan instruadon en la universitata medio. Ministeriaj dispozicioj antaŭvidas eĉ liberigon de universitataj taksoj favore al studentoj partoprenantaj en anglalingvaj kursoj.

Krom tute klara diskriminacio rilate al la studentoj ne scipovantaj la anglan, ĉu ankaŭ ni estas vidontaj tiujn dramajn sekvojn?

Pripensu reagojn.

*VIGLO*




## Portreto de Zamenhof

**sur Loteria Bileto!** La Organizo de Hispanaj Blinduloj (ONCE) multe kaj sukcese laboras por la integriĝo de blinduloj en la socio. Parto de ĝiaj sukcesoj ŝuldiĝas al loterio, tre konata tra la tuta lando per la nomo *Cupón*. Sur kupono – ĉiutage vendata kaj kun specialaj premioj en difinitaj semajnaj tagoj – aperas diversaj bildoj. Nu, la kupono de la venonta 17ª de majo surhavos la portreton de d-ro Zamenhof kaj jenan tekston: "L. L. Zamenhof, creador del esperanto, precursor en la creación de un mundo para todos" kaj apude "2008, Año Internacional de los Idiomas". Iniciatis ĉion ĉi laborgrupo ene de Hispana Esperanto-Federacio, enkadre de diversaj agadoj koncerne la Internacian Jaron de la Lingvoj 2008 kaj la 100-jariĝon de UEA. Kunlaboris por tiu realigo Pedro Zurita, esperantisto kaj ĝenerala sekretario de Tutmonda Unuiĝo de Blinduloj. Por kolektemuloj kaj interesitoj ekster Hispanio, HEF povas peri la aĉeton de la bileto: la kosto estos 5 eŭroj por du biletoj, inkluzive de la sendokostoj. La mendon kaj detalojn pri la pagoproceduro vi povas ricevi mesaĝante al la jena adreso: admin@esperanto.es. Atentu ke vi povas mendi la biletojn maksimume ĝis unu semajno antaŭ la lotaddato (17/05) kaj ke oni sendos ilin tuj post tiu tago.

Estas antaŭvidita gazetarkampanjo en Hispanio por informi al la komunikiloj pri Esperanto kaj la agado pri la Internacia Jaro de Lingvoj. Ĝi komenciĝos kelkajn tagojn antaŭ la lotado, kaj estos kunordigata de la organizo por blinduloj mem.

# El Kubo!

*Mi publikigas la ĉi suban raporton, skribitan de s-ino Yoandra Isabel Rodríguez, Prezidantino de la E-klubo en Sancti-Spíritus, Kubo, ne nur pro ĝia interesa enhavo, sed ankaŭ ĉar ĝi memorigas al mi preskaŭ samajn impresojn ricevitajn dum la ekspozicio "Kara amiko, mi skribas al vi..." okazinta en 2006, jaro de 100-jariĝo de* TEA, *ĉe la Palaco Costanzi. Tiam estis je dispono de vizitantoj libro sur kies paĝoj eblis lasi impresojn, sugestojn, komentojn kaj simile: centojn da tiuj prikonsideroj ni legis poste kaj ĉiu el ili – ĉu pozitiva aŭ mala, tutegalas – havis sian gravecon en la ĝenerala skalo de la prijuĝoj pri nia Esperanto kaj ties movado.*

## Kion neesperanta publiko opinias pri esperanto?

Kadre de la 17ª internacia librofoiro okazinta en Sancti-Spíritus, marte 2008, la loka grupo prezentis ekspozicion pri esperanta literaturo en la artgalerio Oscar Fernández Morera.

Dum tiuj tagoj multaj sanktaspiritanoj alproksimiĝis al nia stando kaj dank'al tio mi havis la okazon kolekti kelkajn opiniojn pri la lingvo Esperanto kaj ties movado kaj rezultoj.

Vizitis nian ekspozicion diversaĝa publiko kaj la opinioj estis malsamaj. Kelkaj favoraj, aliaj ne. Ĉiukaze ili estas tre interesaj kaj stimulis min skribi pri ili.


Inter la simplaj opinioj mi prezentas la jenajn:

- ★ *Kiel kurioza!* - Vere estis kuriozaĵo, ĉar literaturo en Esperanto neniam antaŭe videblis en la regiono dum la pasintaj librofoiroj. Do, tiu ĉi ekspozicio altiris la atenton de multaj.
- ★ *Kiel bela!* - Ni aranĝis tiun ekspozicion kun la celo allogi la neesperantan publikon. La koloroj de la libroj kaj revuoj faris tre belan kontraston.
- ★ *Vi surprizis min!* - Bonege! Ni scias, ke ankoraŭ estas multaj personoj, kiuj scias nenion pri Esperanto aŭ pensas, ke ili scias kaj pro tio erare opinias. Per nia ekspozicio ni pruvis, ke Esperanto vivas kaj utilas.
- ★ *Mia filo rigardis en ĉiuj standoj kaj neniu libro lin allogis; li interesiĝis nur pri tiu belega libro "Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj". Bedaŭrinde ĝi ne aĉeteblas.* - Ne nur infanoj interesiĝis pri tiu ĉi libro kaj, ekzemple, junulino diris: *Kia seniluziiĝo!* ĉar ankaŭ ŝi volis ĝin aĉeti. La plenkreskuloj sentis sin allogataj de tiu ĉi libro. Ĉiuj opiniis ke la koloroj kaj desegnoj estas tre belaj. Eĉ por kelkaj tute ne gravis, ke ĝi estis verkita en fremda lingvo.

Kaj mi prikomentu aliajn opiniojn:

- ★ *La strangaj aferoj estas interesaj por mi.* - Mi min demandas: ĉu vere Esperanto estas *stranga*? Kial la neesperantistoj opinias, ke Esperanto estas *afero stranga*? La respondo estas antaŭ mia nazo: manko de informoj pri nia esperanta lingvo. Estas vualo sur ĝi kaj ankoraŭ multaj pensas, ke temas pri iu religio aŭ sekto.
- ★ *Kiel nobla estis la tiama ideo!* - Nu, kiu ideo? Ĉu la ideo jam ne ekzistas (*tiama*)? Ĉu la ideo jam ne estas *nobla*? Nobla ideo inspiris d-ron Zamenhof krei Esperanton. La ideo pri lingvo internacia uzata en ĉiuj landoj kiel ilo por la bona interkompreniĝo de la homaro, estas grandioza kaj magia, kaj ĝia realiĝo dependas de ni ĉiuj.
- ★ *Ĉu Esperanto ne estas mortinta lingvo?* - Mi ne kapablas kompreni, kiel la homoj povas diri tion kiam ili havas antaŭ siaj okuloj ekzemplerojn de Esperanto-literaturo por diversaj aĝoj. *Mortinta lingvo* estas tio: se mortinta lingvo, per ĝi oni ne povas krei aŭ verki originalajn librojn aŭ traduki verajn universalajn literaturajn juvelojn, kiuj ofte tute ne troveblas en niaj naciaj lingvoj. Ankaŭ la kongresoj aŭ kiu ajn renkontiĝo bildigas, ke Esperanto vivas.
- ★ *La angla lingvo sukcesis en la teknologia kaj medicina fakoj kaj Esperanto ne.* - Kial, bedaŭrinde, ankoraŭ multaj homoj komparas Esperanton kun la angla, kvazaŭ ili estus rivaloj? Tute male. Kial pensi, ke la celo de Esperanto rilatas nur al *la teknologia kaj medicina fakoj*? Mi neniam enkadrigus tiele Esperanton. De antaŭlonge ekzistas multaj fakaj asocioj, kiuj uzas nian lingvon. Esperanto estas ĉie: vi uzu ĝin.
- ★ *Esperanto ne atingis sian celon.* - Kiun celon? - *Esti parolata en ĉiuj landoj.* Unue, mi opinias, ke neniu lingvo estos universale uzata kiel ununura lingvo, ĉar en la nuntempo oni batalas kontraŭ la lingva diskriminacio. Due, Esperanto estas je dispono de ĉiuj kiel dua lingvo favore al la minoritataj lingvoj; ĝi estas gramatike pli simpla ol aliaj lingvoj, do la lernado estas pli rapida kaj facila. Kaj trie, mi sentas, ke nia celo parte jes, estis plenumita, ĉar nia laboro por la disvolvo kaj diskonigo de Esperanto plu ekzistas ekde la jaro 1887 kaj plu ekzistos.

En la esperanta historio ĉiam estis kontraŭuloj kaj ili ankoraŭ troveblas kaj troveblos, sed ni ne timu aŭskulti ilin: tute ne. Ni analizu iliajn kriteriojn, kiuj ja validas kaj riĉigas la niajn, niajn idealojn, kiuj reflektas la klopodojn de multaj homoj laborintaj kaj laborantaj por Esperanto. Kelkaj fizike jam ne plu akompanas nin, sed iliaj instruoj, verkoj, opinioj, ekzemploj, spiritoj, jes.




*Kaj nun ke vi konatiĝis kun la prezidanto de Esperanto-Klubo en Sancti-Spíritus, ĉu vi ŝatus iom pli bone koni ĉi belan urbon de la mirinda Kubo? Ĉu jes? Bone, ĉi sube jen por vi:*

### Skiza historio de SANCTI-SPÍRITUS

Hispanoj fondis la urbon en 1514, kiel unu el la sep unuaj vilaĝoj en Kubo. La fondinto, Diego Velázquez, estis akompanata de Pánfilo de Narváez, Francisco Fernández de Córdoba (malkovrinto de Yucatán), kaj kredeble ankaŭ de Bartolomé de las Casas.

La unua loko estis apud la rivero Tuinucú, sed en 1520 la loĝantoj translokiĝis apud la rivero *Jajabo* pro ne preciza kialo. La historiistoj havas tri hipotezojn:

- Atakoj de danĝeraj formikoj
- Interŝanĝo de terpeco fare de la posedantino
- Ekonomiaj problemoj

Tiel estis, ke en 1522, Sancti-Spíritus definitive lokiĝis ĉe la maldekstra bordo de la rivero *Jajabo*. Tiam ĝi ampleksis vastan teritorion: 400 kilometrojn en la okcidenta direkto. Oficialaj dokumentoj pruvas, ke la jurisdikcio etendiĝis preskaŭ ĝis Bainoa, en Havano, kiu tiutempe ankoraŭ ne estis la ĉefurbo.

La geografia situo de la urbo en la koncerna jaro, estis: 21 gradoj, 49 minutoj, 45 sekundoj, laŭ la turo de la Ĉefa Preĝejo (*Iglesia Mayor*).



Inter 1588 kaj 1719 okazis kelkaj atakoj de piratoj kaj korsaroj, kun detruado de arĥivoj, ŝtelagado, bruligo. En 1665 la urbo estis rekonstruita. La $20^{an}$ de aŭgusto 1667, bone armita grupo de defendantoj sukcesis forkurigi piratojn dum nova atako. La evoluo de la urbo estis alloga por tiaj rabistoj, kiuj la $13^{an}$ de decembro 1719 sukcesis detrui kelkajn bienojn antaŭ ol forkuri.

En la $19^{a}$ jarcento kelkaj famuloj vizitis la teritorion: La famkonata germana sciencisto Alejandro de Humboldt alvenis al Trinidad la $14^{an}$ de marto 1801; komence de aprilo la episkopo Juan José Díaz de Espada y Landa troviĝis en Sancti-Spíritus, kaj li diktis rezolucion malpermesantan la entombigon de mortintoj en la preĝejoj.

La $6^{an}$ de julio 1830, la nomata "nevenkebla bataliono" de Tarragona alvenis al Sancti-Spíritus.

Inter la jaroj 1831 kaj 1848, la loĝantaro en la teritorio nombris 42 204 homojn, el kiuj 7 417 liberaj nigruloj kaj 9 553 sklavoj. La $15^{an}$ de julio 1839 okazis la inaŭguro de la Ĉefa Teatro (*Teatro Principal*), post 11 monatoj de laboro. La plej ŝatataj festoj inter 1849 kaj 1861, estis Sankta Semajno, Santiago kaj Kristnasko, dum kiuj montriĝis la religia karaktero de la tiama popolo.

Per Reĝa Ordono de la $12^{a}$ de majo 1862, la vilaĝo Sancti-Spíritus ricevis la nomon **Urbo Sancti-Spíritus**, kaj la loĝantoj festis senhalte dum pluraj tagoj. La urbo estis bele ornamita, kaj okazis militistaj paradoj.

La Kuba Respubliko naskiĝis la $20^{an}$ de majo 1902, kiam Tomás Estrada Palma fariĝis Prezidento.

La $2^{an}$ de decembro 1957 alvenis la ŝipo *Granma* kun 81 homoj gvidataj de Fidel Castro Ruz. La $23^{an}$ de decembro 1958, je la 6:30 ptm, la loka radiostacio CMHT disaŭdigis la novaĵon: Sancti-Spíritus estas libera teritorio.

Laŭ statistiko de decembro 1994, la loĝantaron konsistigas 119 561 homoj, el kiuj 59 884 estas viroj kaj 59 677 virinoj.

**Fonto:** http://esperkubo.googlepages.com/eokubo.htm. Paĝo administrata de Norberto Díaz Guevara

## Eventeo

**nova eleganta novaĵretejo** Antaŭ kelkaj tagoj ekfunkciis ĉi tiu internacia novaĵ-portalo en lingvo internacia, kie ĉiutage aperas la plej last-lastaj novaĵoj el ĉiuj kontinentoj de nia mondo. Tiuj devenas el la plej diversaj fontoj de la internacia gazetaro, kompilitaj, resumitaj kaj tradukitaj esperanten. Per tio oni provas informi la legantojn pri la plej diversaj temoj laŭeble sen specifa nacia vidpunkto. Simpla kaj eleganta, ĉefe facile uzebla, estas la ĉefenirejo kaj la uzata lingvo klara kaj bonstila. Oni estas ankoraŭ ĝin prilaboranta kaj realiganta, nome kelkaj ligoj foje ne bone funkcias, aŭ io ankoraŭ mankas: fakte la prizorganta teamo, kiu bedaŭrinde ĝis nun ne prezentiĝis, jam avertas ke: "momente tiu ĉi versio de **eventeo** estas nur testa, baldaŭ aperos pliaj detaloj kaj servoj por la legantaro". Sed valoras tajpi ties adreson: htpp://eo.eventeo.net kaj mem rigardi kaj prijuĝi. Jen, por via scivolemo, kelkaj el la plej lastaj artikoloj: **Tiranosaŭro praulo de niaj bridoj** - Usono: La unua analizo de proteino eltirita de dinosaŭra osto konfirmas, ke la hodiaŭaj birdoj estas la plej proksimaj posteuloj de la timiga "Tyrannosaurus rex", laŭ esploro eldonita de la usona revuo *Science*, vendredon la $25^{an}$ de aprilo; **Televidkanalo por Majaoj naskiĝis** - Gvatemalo: La Indianoj de Gvatemalo fine disponas je sia propra televidkanalo, TV MAYA. Ĝi dissendas, per la 23 Majaaj dialektoj de la lando, kulturajn kaj informajn programojn, kiuj donas Majaan vidpunkton kaj proponas alternativon al la komercaj programoj. "*Estis nia revo ekde multaj jaroj, ricevi amaskomunikilon, ĉar la jam ekzistantaj neniam servis la miljarajn civilizaciojn, nek niajn opiniojn, nek la lingvajn zonojn*", deklaris la Nobelpremiito pri paco 1992, Rigoberta Menchu, kiu ĉeestis la eklanĉon de la kanalo. Ankoraŭ unu: **Manĝu legomojn!** - Britio: Jen bona kialo por manĝi pli da fruktoj kaj legomoj! Angla studaĵo ĵus konkludis, ke vegetarismon elektas inteligentaj homoj. Ĉi tiun esploraĵon publikigas la grava kaj serioza Universitato de Southampton, en Anglio, kaj ĝin lastatempe ankaŭ eldonis la Brita Kuracista Revuo. La esploristoj studis la ligon inter la evoluado de la inteligenteco de infanoj kaj iliaj manĝaĵoj. Nu, mia konsilo estas: **ek al vizito de eventeo**!



## Premio Ada Fighiera Sikorska

Lokaj, naciaj, internaciaj kaj fakaj Esperanto-Asocioj, same kiel individuaj esperantistoj en la tuta mondo estas petataj proponi kandidatojn por la **Premio Ada Fighiera Sikorska**, aljuĝota en Salou dum la $16^{a}$ Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo (4-11 de oktobro 2008).

La Premio estis kreita antaŭ tri jaroj memore al Ada Sikorska, kiu sindediĉe dum 34 jaroj laboris por Esperanto kaj ĝis sia morto redaktis la tiaman sendependan gazeton HEROLDO DE ESPERANTO. La Premio estas destinita al esperantistoj, kiuj aparte distingiĝis pro sia valora kaj meritplena agado favore al la Internacia Lingvo Esperanto.

La Premio konsistos el medalo kaj diplomo, sur kiu, krom la nomo de la Internacia Esperanto-Semajno, aperos reliefa bildo de Ada Fighiera Sikorska kaj dorse la gravurita nomo de la premiito, dato kaj loko de la Semajno.

Proponoj atingu, antaŭ la $15^{a}$ de aŭgusto 2008 G.C. Fighiera, Via Sandre 15-10078 Venaria Reale (To) Italio. giancarlo.fighiera@libero.it Informojn pri la Internacia Semajno en Salou ĉe http://personales.ya.com/semajno

## Mallonge pri...

Se vi iras al la paĝaro http://www.arabujo.afriko.org/ de la Komisiono pri agado en la Meza Oriento kaj Norda Afriko, vi trovos ligilon al la reta versio de la Korano. Klaku sur: La Sankta Korano (enreta). Tamen nur parto de ĝi estas prezentita.

**Maritza Gutierrez** - esperanto05@ain.cu - *informas*, ke **Kuba Informa Agentejo ACN** renovigis sian paĝaron. Pro la fakto ke esperantlingva servo bezonas daŭre pruvi sian utilecon, Maritza invitas vin viziti la paĝon: http://www.cubanoticoj.ain.cu Ĉiu vizito multe kontribuos al ties plua ekzisto kaj konfirmos utilecon de Esperanto.

**Radio Aktiva**, Ponto de Esperanto el Urugvajo, elsendas *Esperantan radioprogramon tra interreto, ĉiutage*, en 24 horoj, ekde septembro 2006. La 2-3-hora programbloko ripetiĝas dum la tuta tago. Pro malalta kvanto de aŭskultantoj tamen leviĝis la demando: "Ĉu daŭrigi aŭ ĉesigi la ĉiutagan elsendon?" Ankaŭ vi estas petata plenigi malgrandan enketilon ĉe la retejo de la stacio. En tiu okazo, indas viziti ĝin: fakte tre varia la temaro: primovadaj aferoj, esperanta rokmuziko, rakontoj por infanoj, intervjuoj, kuriozaĵoj kaj kompreneble ankaŭ kurso pri esperanto. Subtenu la skipon de "Radio Aktiva en Esperanto" per viaj reago kaj respondo al la enketilo: http://radioaktiva.esperanto.org.uy

**Se la lingva problemaro** en Eŭropa Unio interesas vin, vidu http://www.europo.eu Legu pri la plej aktualaj novaĵoj, rilataj al la agado de EEU. Oni volonte aperigas ankaŭ ĉies kontribuon, kaze ke ĝi tuŝu aferojn pri lingva demokratio en Eŭropo. Raportojn, novaĵojn bv. sendi al: eeu@europo.eu

**Grosseto vokas vin!** Venu en la toskanan Maremon por partopreni en la 75ª Itala Kongreso, kiu okazos en Grosseto, de la 22ª ĝis la 29ª de aŭgusto! Vi ĝuos tre interesajn kongresajn aranĝojn kaj tre ĉarmajn lokojn ĉe la maro, montetoj, montaro! Pliaj informoj venontbultene!

## TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

lanĉas la 3an Internacian Konkurson - jaro 2008

*kun la temo*

## Kristnasko: bilde kaj poezie

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **10ª de novembro 2008**, siajn verkojn al la jena adreso:

**ESPERANTO TRIESTE - C.P. 601 Trieste Centro**
**IT-34101 TRIESTE - ITALIA**

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorio:

1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio
2) poeziaĵo.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

La poeziaĵo estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

* persona kaj familia nomoj;
* poŝta adreso;
* aĝo;
* lernejo kaj klaso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Kromajn detalojn/informojn vi povas ricevi rete de noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com aŭ poŝte adresante viajn leterojn al Triesta Esperanto-Asocio.

OSIEK, la ORGANIZA SOCIETO DE INTERNACIAJ ESPERANTO-KONFERENCOJ, estas rendevuejo de esperantistoj kiuj ŝatas renkontiĝi kaj senfanatisme diskutadi sentabuajn temojn. Ĝi celas prezenti prelegojn kaj pridiskuti *ilin* en etoso de amikeco kaj reciproka respekto. OSIEK estas organizaĵo por Esperanto, ĉar ĉio kio okazas per Esperanto estas iamaniere por Esperanto. INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO okazas ĉiujare en alia loko, kiel eble interesa el vidpunkto de kultura turismo. La konferencanoj per sekreta voĉdonado elektas la lokon de la venontaj konferencoj, kutime lasante al la loka organizanto du jarojn por preparado.

Ĉijare la konferenco okazos ekde la 12ª ĝis la 18ª de julio en Šempeter pri Gorici, Slovenio, zorge de Viŝnja Brankoviĉ-ORBIS PICTUS. La temo de IEK estas: *Fernando de Diego, vivo kaj verkaro*. Kutime almenaŭ kvin prelegoj rilatos al *tiu ĉi temo*, dum la aliaj al historiaj kaj geografiaj problemoj de Slovenio, kaj unu al ia aspekto de Esperanto-kulturo. Grava tasko de IEK-oj estas atribuado de OSIEK-premio. Ĉiu societano rajtas proponi ŝatatan verkon nefikcian ĝis komenco de majo. El inter la proponitaj verkaĵoj la 5 plej ofte proponitaj estos prezentataj, la 18an de julio 2008, al la ĝenerala asembleo de OSIEK, kiu per sekreta voĉdonado du-balota atribuos la premion al vivanta aŭtoro de unu el la kvin verkoj. La premio egalas nun al 600 eŭroj: ĝi entute elvenas el la modestaj kotizoj de la membraro. Kotizo estas valoro de 25 poŝtmarkoj por sendi enlandan leteron. Pliaj informoj ĉe:

Eric Laubacher, 1 rue Bougainville, 78180 Montigny-Bx., Francio - kasisto@osiek.org kaj ORBIS PICTUS de Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, 34129 Trieste, Italio - orbispictus@iol.it

**Ingemund Bengtsson**, prezidinto de Sveda Parlamento, tiel diris: "... Al tiuj kiuj asertas ke Esperanto estas nura bela revo, jam aĝanta pli ol 100 jarojn, mi respondas ke ankaŭ Paco estas bela homara revo, aĝanta pli ol 1000 jarojn, tamen ni ankoraŭ ne rezignas ĝin plue alstrebi".

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Redaktanto**: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
**Tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; noredv@tele2.it
**Grupa ttt-ejo**://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
**Poŝta adreso**: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio
**Poŝtĉekkonto** N° 10834349

## Maja Programo

| | |
|---|---|
| 02 - vendredo | 20h00 - IFEF-Kongreso en Poznan - prezento de Triesto, per fotoj |
| 06 - mardo | 20h00 - IFEF-Kongreso 2009 |
| 09 - vendredo | 20h00 - Diapozitivoj pri Bengaluro, Suda Hindio, zorge de Anita |
| 13 - mardo | 20h00 - IFEF-Kongreso 2009: ekskursoj duontagaj kaj tuttagaj |
| 16 - vendredo | 20h00 - ESPERANTAĴOJ, zorge de Elena Zerpini |
| 20 - mardo | 20h00 - El esperanta gazetaro |
| 23 - vendredo | 20h00 - Kartludado: trisepo aŭ rumio? |
| 27 - mardo | 20h00 - Poznan: impresoj pri la 60a IFEF-Kongreso |
| 30 - vendredo | 20h00 - *Lecturae Dantis* Esperante, itale kaj triestadialekte |

## Junia Programo

| | |
|---|---|
| 03 - mardo | 20h00 - Lernu kaj rememoru! |
| **06 - vendredo** | **17h30 ĉe *Caffè San Marco* - Projekto "*MALFERMITAJ PORDOJ*": Poezio trans la landlimoj** |
| 10 - mardo | 20h00 - IFEF-Kongreso 2009 |
| 13 - vendredo | 20h00 - Filmo pri Ĉinio |
| 17 - mardo | 20h00 - IFEF-Kongreso 2009 |
| 20 - vendredo | 20h00 - *Lecturae Dantis* Esperante, itale kaj triestadialekte |
| 24 - mardo | 20h00 - SOMERA FESTO* |
| 27 - vendredo | 20h00 - Enigmoj en Esperanto |

## Mi devas rememori pri...

### Projekto "Malfermitaj Pordoj" sub patronado de Provinco de Triesto

Ni startigos la realigadon de tiu ĉi grava projekto, elpensita por celebri la forigon de la baroj inter la Eŭropaj landoj, per la dua punkto de la programo: "Verkistoj kaj poetoj el lingvoj, kulturoj kaj tradicioj malsamaj".
**La 6an de junio, je la 17h30, ĉe *Caffè San Marco*,** kunlabore kun la asocio "POEZIO KAJ SOLIDARECO", ni prezentos tri poetinojn kiuj legos siajn verkojn.
Bonvolu partopreni!

*** 27an de junio**: Antaŭ la fermo de TEA-sidejo por la kutima somerferiado, duonjulia kaj aŭgusta, ni kune festu, ĝuu kunestadon en amika etoso, reciproke nin salutu, antaŭvide al ripoziga feria periodo tra la mondo, kune kun alilanda esperantistaro. En septembro, kunportu ĉiujn rememorojn, belajn fotojn kaj impresojn pri viaj dumsomeraj okazaĵoj!

***Uno per tutti ... cinque per mille!***
**AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO**
***Il 5 per mille dell'IRPEF***
*all'Associazione Esperantista triestina*
*senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il 5 per mille dell'imposta stessa a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

**La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.**

Come fare? È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2007 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

**90012340320**

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto della dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina**

### Rido sanigas

**Enstaligo** Tio okazis en Usono en 1926. S-ino Sara Goldstein *(tipa juda nomo)* el Ĉikago iris unuafoje feriadi en Florido. Ŝi atingis hoteleton kaj diris al la direktoro: "Mia nomo estas Goldstein kaj mi deziras mendi ĉambron por du semajnoj." ***Hotelisto***: "Mi bedaŭras, sed ni ne luigas ĉambrojn al judoj." ***S-ino Goldstein***: "Judoj? Kiu estas judo? Mi estas katolika!" ***H***: "Mi apenaŭ povas kredi. Bonvolu diri al mi, sinjorino, kiu estis la Filo de Dio?" ***S-ino G***: "Jesuo, Filo de Sankta Maria." ***H***: "Kie Li naskiĝis?" ***S-ino G***: "En stalo." ***H***: "Kial Li naskiĝis tie?" ***S-ino G***: "Ĉar fripono kia vi ne konsentis luigi al li, judo, ĉambron en sia hotelo!"

**Rabeno kaj pastro** Rabeno kaj pastro veturas samkupee per trajno iranta de Rigo al Dźwińsk. La pastro decidis primoki la rabenon: *"Ni prezentu demandojn unu al la alia. Tiu, kiu ne scios la respondon, pagos al la alia 100 rublojn. Ĉu vi konsentas?"* Rabeno: "Mi ege ŝatus ludi, sed mi ne havas tiom da mono." Pastro: *"Do ni faru tiele: se vi ne scios la respondon, vi pagos al mi nur unu rublon. Sed se mi ne scios respondi, mi pagos al vi centon."* R: "Konsentite. Mi volas demandi unua." P: *"Bonvolu!"* R: "Kiu havas 10 okulojn, 7 flugilojn kaj 4 vostojn?" P. (post longa pripensado): *"Mi ne scias. Kio estas la respondo?"* R: "Mi tuj diros al vi, sed unue pagu al mi la 100 rublojn." La pastro elpoŝigis 100 rublojn, transdonis ilin al la rabeno kaj kriegis kolere: *"Kio estas la respondo?!"* R: "Mi ne scias. Prenu unu rublon!"

*Fonto: listo de amantoj de judaj humuraĵoj.*